

en esperanton

## **Gluntar translated from Danish (!) by Poul THORSEN.**

Gluntar nr IV, V, VI och VIII

### **Glunt nr IV En manskensnatt på Slotsbacken**

**Ho, mia Dio, la luno brilas**

Ho, mia Dio, la luno brilas.  
Vidu la lumon super la urbet'.  
Steloj sur klara ĉiel' trankvilas,  
treme invitas nin por amikec'.

Jen flamas Sirius jen Orion,  
banas sin la Cigno en nokt-kviet'.  
Ho, mia Dio, la luno brilas.  
Vidu la lumon super la urbet'.

Kie troveblas en Sveda Lando  
loko kun nokto de simila bel'?

Dormi prefere ĉe voja rando  
ol sur kusenoj supre en kastel'.

Tamen nun ek por frapveki Lamby. (\*)  
Kio pli bongustas ol nokt-botel'?  
Kie troveblas en Sveda Lando  
loko kun nokto de simila bel'?

### **Glunt nr V: Glunten på föreläsning.**

**La glunto en auxditorio**

**Alt. rubrik; La glunto en aŭditorio**

Ĉu vi aŭdis pri mia fatal'  
per Diablo sendita?  
Se mi pensas pri la skandal',  
hontas mi plenmerita.  
Ĝis nun aŭdis mi pri neni'.  
Diru tuj, ke mi konu pli.

Mi vizitis ...

Malsaĝe, jes!  
Stultege, jes!

Mi vizitis prelegon, ke  
konu min profesoro

unu fojon almenaŭ de  
mia ŝajna fervoro.

Ne malbona semestro-fin'.  
Do, vi bone lokigis vin?

Benk' unua

Malsaĝe, jes!  
Stultege, jes!

Benk' unua, malplena lok',  
sola tie mi tronis  
sen ĉapelo kaj sen apog'  
dum prelego eksonis.

Tute bone ĝis nun, ĉu ne?  
Kial do via aĥ kaj ve?

Pro la gumo ...

Malsaĝe, jes!  
Stultege, jes':

Pro la gumo-elastiko,  
trahakita, deklama,  
eklezia pneŭmatiko,  
sensencaĵo fifama.

Jes, tedege aŭskulti, ĉu?  
Kial resti kaj stulti plu?

La aero ...

Malsaĝe, jes!  
Stultege, jes!

La aero kaj varmo-sent  
tute melankolie  
premis pli ol la elokvent'  
ĝis aŭskulto nenie.

Mi komprenas l'aferon nun.  
Vi ekcedis al palpebrum.

Mi ekdormis ...

Malsaĝe, jes!

Stultege, jes!

Mi ekdormis, amiko, fi!  
Ĉu simile spektiĝis?  
Horo pasis de du ĝis tri,  
antaŭ ol mi vekiĝis.

Jes, fatale, sed fi kaj for,  
se ne vidis vin profesor'.

Sed mi ronkis ...

Malsaĝe, jes!  
Stultege, jes!

Jes, mi ronkis, freneza ĝu'  
por salona humoro.  
Pro ronkego kaj rido-bru'  
finis la profesoro.

Nu, anstataŭ skandala fin'  
kial simple ne veki vin?

Ili provis ...

Malsaĝe, jes!  
Stultege, jes!

## **Glunt nr VI En solnedgång i Eklundshofs-skogen:**

### **Sunsubiro en la Eklundarbaro"**

Aj, kiel bele nun  
sine de la naturo.  
For de l'studenta zum'  
for de la urba fum'.  
Sur la ciela blu'  
- blua angel-okulo  
glitas nubetoj plu:  
blanka ŝafida-flu'.

Alte tra la arbar'  
ĝeme la pinoj spiras.  
Klinas sin par' ĉe par'  
blanka galanto-mar'

Ho, subiranta Sun',  
iom hezitu nun!  
Sen via brila bel'  
orfas ni en malhel'.  
Vidu, ĉu ne sur musk'  
elfoj festene dancas?  
Turdoj el la arbust'  
taktas el plena Brust'.

Turdo, silentu jam!  
Lasu al Sun' parolon.  
El la fadanta varm'  
fluas rideto-flam'.

Ho, subiranta Sun',  
iom hezitu nun.  
Sen via brila bel'  
orfas ni en malhel'

### **Glunt nr VIII Huruledes månen intresserar sig för Glunten och Magistern Tiamaniere la luno interesigxas por la glunto kaj la magistro"**

Mi kredas, ke jam tempas nun  
pripensi la refrenon.  
Plej festa tago finas kun  
litplumoj la promenon.  
Kaj dolĉe sonĝi laŭ kutim'  
pri oro kaj arbaroj,  
en propra hejmo varmulin'  
- drinkejo kaj najbaroj.

Rectissime! Strictissime!  
Kaj tostu, amantissime!  
En propra hejmo varmulin' -  
drinkejoj kaj najbaroj.

La lunon vidu - kun frivol'  
li gapas al pavimo.  
Ĉu estas, frato, li simbol!  
pri nia pantomimo?

Ĉagrenas lin ofice, ke  
sen unu sola guto  
li tamen vagu tie tre  
plenplena kiel puto.

Rectissime! Strictissime!

Kaj tostu, amantissime!  
Li tamen vagu tie tre  
plenplena kiel puto!

Ho, vidas mi: Li brilas al  
ŝlostruo de la loĝo,  
ne ŝatas, he la bakanal'  
finiĝu per diboĉo.

Matenon bonan! Post plezur'  
nun al la hejma celo.  
Direktas al ŝancela krur'  
la kara lun-kandelo!

Rectissime! Stricktissime!  
Kaj tostu, amantissime!  
Direktas al ŝancela krur'  
la kara lun-kandelo!

Ur författarregister till tidskriften Norda Prismo: Gunnar Wennerberg (1817-1901).  
Svedo, verkis la kantoteatraĵon Gluntarne (1849-1851). (PT) &2328, 3274, 3296,  
3723, 3928, 3934, 4816, 4894, 5248.  
Är osäker på vad siffrorna hänsyftar på  
&4816. Glunten på föreläsning